



Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista. 3 FF
Unujara abono kun adresaro : 18 FF al la poŝtkonto
n° 3 371 74 M BORDEAUX de la eldonanto :
Cercle espérantiste de l'Agenais, F 47340 LAROQUE TIMBAUT.



Fel... ĉifan Novjaron !

*Vagonojn da entuziasmo kaj...
almenaŭ 1 ridegon ĉiutage al ĉiu!*

***** V I V O de "Laŭte!" *****

Bilanco 1982

Kasbilanco (en francaj frankoj)

Abonoj + donacoj	7506,80	Eldonkostoj	4300,50
Antaŭa saldo		Afrankokostoj	972,69
(fine de 1981)	<u>3168,27</u>	Nova saldo	<u>5401,88</u>
	10675,07		10675,07

En 1982 ni publikigis saman paĝokvanton kiel en 1981, sed per unu malplia numero, kio ŝparigis iom da afranko. Ĉiuj kostoj regule plialtiĝas. Tial necesos adaptiĝi por 1984: la abonprezo fariĝos 20 FF ekde julio 1983. Ni esperas, ke paralele kompensas plibonigo de la bulteno, dank'al ĉies verkemo!

Abonantaro: Post relativa stabileco en 1981 (288 en 16 landoj), la abonombro plu kreskis en 1982 (fine: 333 en 24 landoj), ĉefe dank'al disvastiĝo de L! eksterfrancie tiel per rektaj kiel per "donacitaj" abonoj.

Partopreno kaj internacieco

Ĉar partoprenas relative multaj abonantoj per siaj kontribuoj, la enhavo estas tre varia. Ĝenerale, ĉiu proponita temo vekas opiniesprimadon de aliaj legantoj. Nur unu bedaŭron havas la redaktanto: ne venas ankoraŭ sufiĉe da kontribuoj el ekster Francio! Por iom orienti al pli da internacieco ni nun nepre bezonas plurajn nefrancajn kunlaborant(in)ojn en la korespondsistemo per ĉenleteroj, kiuj provizas la rubrikon "Nia debato". Kiel "varbi" ilin, jen mistero! Ni kalkulas ĉefe kun la ĝenerale entuziasmaj laŭdoj ricevataj ĉe la red. Certe iuj feliĉaj "konsumantoj" emos iom "produkti" siavice, ĉu ne? Kompreneble, ĉar "Laŭte!" naskiĝis kiel regiona bulteneto en Francio antaŭ ol fariĝi tutfrancia kaj nun internacia, tiu "franceco" estas normala en la komenco, sed se nia bulteno restus franca monopolo, dum kreskas la abonantaro alilanda, nu,...hm..., kiel domaĝe, ĉu ne?

Kribo

***** SAT-B R O Ŝ U R S E R V O 1982 *****

Vendoj-Provizoj	18976,76	Eldonado	9664,05
Donacoj	250.	Afranko	3220,70
Diversaĵoj	182	Transpagoj	1725,60
Antaŭa saldo	<u>3879,43</u>	Nova saldo	<u>8677,84</u>
	23288,19		23288,19

En la kaso (nova saldo) troviĝas 6774,70 FF kiel ŝuldo al provizintoj. En stoko grandega kvanto da disvendotaj broŝuroj, proksimuma valoro: 34000 FF.

Kribo.

NIA DEBATO



KIEL VIVANTIGI E-GAZETON?

Kial tiu temo? Ĉu vere eblas "vivantigi" E-gazeton? Kiel kaj kiu?

Redaktanto de E-gazeto skribis al la red. de "Laŭte!", petante sugestojn kaj konsilojn por vivantigi sian propran gazeton. Mi estis samtempe flatita... kaj embarasita. Unue, ĉar se "Laŭte" povas aspekti "vivanta" kompare al aliaj E-gazetoj, certe ne ĉio estas perfekta en ĝi. Vivanteco/malvivanteco povas fondi el multaj kialoj, kaj certe multo dependas de la legantaro, nur duarange de la redaktanto. La respondo - per sugestoj aŭ konsiloj - povas doni do ĉefe la abonantaro, almenaŭ ĝia plej aktiva parto.

Tial la ideo debati per ĉenletero pri tiu ĉi temo...

La formulo uzata por "Laŭte!" verŝajne ne tute taŭgas por ĉiu ajn E-gazeto. En Esperantio ekzistas multegaj asociaj kaj fakaj bultenoj kaj nur tre malmultaj gazetoj aboneblaj sen samtempa aniĝo al grupo aŭ asocio. Estas eble pli facile al "sendependa" gazeto, ol al asocia organo, enkonduki fantazion, humuron, unuvorte vivon en siajn paĝojn. Tamen, eĉ faka organo povas aspekti vivanta, laŭ la humoro de sia redaktantaro. Iuj gazetoj estas redaktataj de malmultmembra redakcikomitato (kaj tiam depen-

das ĉefe de ties "humoro", ekzemple "LKK"), aŭ de tuta reto da kunlaborantoj (MONATO, la nura prizorgata de profesulo). La aparta formulo de "L!" faras el la "humoro" de la tuta abonantaro la bazon mem de sia ekzistokialo kaj ekzistomaniero. Se la abonantaro dormus, la tuta gazeto estus dormiga, ĝis morto, ĉar ne plenigus la paĝojn eventuala redaktoro aŭ red.-komitato, sed tiu formulo povas aspekti danĝera, nur se la aperigo de la bulteno estus celo en si mem, dum ĝi ja estas nur rimedo respondanta bezonon : la bezonon sin esprimi.

Se ekzemple en asocio velkas la organo, tio estas signalo alarmanta pri la velkado de la asocianaro ĝenerale. Almenaŭ se tiu organo estas laŭstatute uzebla sen cenzuro de ĉiu ajn ano. La solvo tiam kuŝas ne en la formulo de la gazeto, sed en la ekzistokialo de la asocio mem.

Male, se viglas asocio, dum ties organo ne aŭ malbone spegulas tiun vivecon, tiam oni esploru ĉe la organ-formulo : certe tie eblas plibonigoj ; oni adaptu la formulon al la aspiroj, la "humoro" de la membraro.

Kompreneble, "Laŭte!" estas iom aparta afero. Ĝia formulo ebligas iel nuligi la distancon leganto/redaktanto. Ĉiu leganto estas kunverkanto de sia bulteno. La oficiala redaktanto fakte nur redaktas, t.e. kontrolas la lingvon kaj enpaĝigas. Al tio neeviteble aldoniĝas rolo de animanto, sed tiu animado fare de la red. necesas, nur kiam ĝi ne fontas nature el la legantaro mem. Tiam, la intervenoj de la red. kiel red. estas nur "administraj". La gazeto apartenas al ĉiuj kaj ĉiuj decidas ĝian orientiĝon per sia propra partopreno.

Tiun - por mi - idealon oni malfacile kaj eble ĉiam nur provizore povas atingi. Tial, ni esploru la respektivajn rolojn, eĉ devojn de redaktantoj kaj tiujn de nepasivaj gazetlegantoj. Se vi, redaktanto, estus nur leganto, kiel vi rilatus al via gazeto ? Se vi, leganto, subite fariĝus redaktanto, kion vi iniciatus ?

La redaktanto/eldonanto, laŭ la disponebla abonmono, la propraj emoj kaj sugestoj de legantoj, povas iniciati por la materia, ekstera, aspekto de la gazeto (titoloj, enpaĝigo...), eĉ peti de la legantaro - ekzemple per demandilo, sed atentu! tio valoras nur se la legantaro mem estas vigla - pri la dezirinda "formulo". Ĉiu gazeto devus havi apartan stilon, personecon. Kelkajn principojn mi

mem aplikis kiel red. de "La Juna Penso" (kiam mi estis juna) kaj nun plu aplikas en "Laŭte!" :

- kiel eble plej rapide publikigi la "urĝan" materialon ;
- kuraĝigi per letereto kaj tuja aperigo la unuafojan kunlaboranton ;
- eviti monopoligon fare de fakuloj, lertuloj aŭ "tradukmaŝinoj" ;
- ĉiam instigi kaj favori la esprimadon de personaj ideoj, ktp...

Kribo.

.....

Mi opinias, ke nur la partopreno de la legantaro en la gazetenhavo vivantigas ĝin. Plie, la legantaro fariĝas familio, kies anoj per la gazetenhavo pli intime konatiĝas. Ĉiu el ni, kiuj regule legas gazeton, havas preferon por kroniko, rubriko de iu, kies subskribon oni tuj serĉas antaŭ ol legi la ceteron. Tiaj kronikistoj iom post iom fariĝas amikoj, kvankam ni ne renkontas (os) ilin. Kompreneble, pri E-gazeto tiaj sentoj estas pli altgradaj - ni jam estas familianoj, ĉu ne ? kaj havas komunan celon, kiu estas forta ligilo.

Sed tio ĉi-supra ne sufiĉas, laŭ mi. Necesas amikareto, kiu zorgas pri la "kreskado" de la gazeto, kvazaŭ gepatroj pri sia infano. Tiu amikareto ĉirkaŭas la redaktanton, kies personeco estas grava faktoro.

Same kiel verkistoj mi aldonas : "iu ajn simileco estas tute hazarda". Eble, pluraj geamikoj miaj ne kredos tion...

Suzana.

.....

Jakelino : P R I M I A P R O P R A S P E R T O

Mi opinias, ke oni ne povas paroli pri E-gazetoj ĝenerale, ĉar ili estas diversaj. "Laŭte!" povas aperigi ion ajn, ĉar ĝi ne estas faka gazeto. Sed, se profesia botanikisto decidas krei gazeton en E-o pri botaniko, kaj se iu leganto sendas artikolon pri la seksa vivo de elefantoj, kompreneble la artikolo estos rifuzata, ne, ĉar la gazeto estus cenzurema, sed

Ĉar elefantoj ne estas plantoj. Pro tiu neeblo mi rakontas nur pri la gazetoj, en kiuj mi devis partopreni :

La porpacaj rubrikoj de LJP kaj de Sennaciulo

Kiam mi akceptis fariĝi sekretario de la pacista frakcio de SAT, mi naive pensis, ke mi nur redaktos, t.e. kontrolos la lingvon kaj disponos la artikolon por fari la stencilon. Sed jen : neniu sendis al mi artikolon por la rubriko de la frakcio. Do kion fari ? Mi mem verkis artikolojn por plenigi la paĝojn, mi metis tien informojn, kiuj povas interesi pacistojn de diversaj landoj, sed ankaŭ opiniojn miajn. Do, ĉiufoje, kiam LJP sukcesis aperi, la legantoj rajtis je la titolo "por la paco", unu aŭ du paĝo(j)n da jakelinismo. Kiel fari alie ? Iam Vemo skribis al mi persone, ke li malaprobas la leĝproponon pri unuflanka malarmado de Francio. Do mi skribis al li : "verku por ni artikolon pri via opinio pri tiu temo". Tion li faris, lian artikolon mi rebatis, kaj iu alia volis sin esprimi pri la temo. Sed nur unufoje, kaj pro iniciato mia, tio okazis. Post unu jaro, mi pensis, ke jakelinismo ne estas la tuto de pacismo, do mi sendis leteron al Bert, por ke li informu la frakcion, ke mi estis elektita por unu jaro, kaj ke mi ne rekandidatas. Mi ne povis mem partopreni la kongreson, ĉar ĝi estis samtempa, kiel la manifestacio en Malville, kien mi nepre volis iri. La frakcio ne sukcesis trovi anstataŭanton, tial pluraj kamaradoj skribis al mi, ke mi plu sekretariu, do mi plu jakelinis en LJP, ĝis mia sanstato tion ne plu ebligis. Post tiam, la rubriko malaperis pro manko de (porpacaj) batalantoj. Ĉar LJP nun ne plu sukcesas regule aperi, tion oni ne rimarkas, sed fakte, se ĝi aperus regule, mankus la porpaca rubriko, ĉar ŝajne neniu krom mi havas ion ajn por diri pri paco. Mi decidis ke, eĉ kiam mi fartos tute bone (tio ankoraŭ ne estas la kazo) mi ne akceptos refariĝi sekretario, ĉar mi ekmalŝatas jakelinismon; kiel scias homeopatoj, oni ne devas tro superi la dozon !

K-do Kunze proponis, ke oni aperigu en Sennaciulo la nomojn de enkarcerigitaj soldatservrifuzantoj, por ke oni povu skribi al ili en Esperanto. Tiu propono estis akceptita (fakte, mi neniam vidis en SAT-frakcioj ion ajn rifuzitan!). Sed jen : neniu el la voĉdonintoj - krom unufoje Bert - sendis al mi adresojn. Do mi aperigis en Sennaciulo la adresojn menciitajn en la gazetoj, kiujn mi mem ricevis

(tiun de la italaj neperfortuloj mi ricevis per interŝanĝo kun LJP, la aliajn mi abonis pro propra ŝato). Tial aperis adresoj de francoj, franclingvaj svisoj kaj italoj, kelkfoje de aliaj, sed preskaŭ ĉiam nur de okcidentanoj. Mi provis ricevi la liston de la internacio de la militrifuzantoj, sed ĝi neniam respondis mian leteron. Tamen, pro interveno de kamarado, kiu mem estis membro de ĝi, ĝi finfine alvenis, kaj tiel la rubriko fariĝis iom pli internacia. Sed tio bezonis jarojn. Do kiel fari ? Mi trovis la frakcion multe tro okcidenta, sed mi ne kulpas, ke mi mem estas okcidenta, tion mi tute ne povas ŝanĝi. Do iam mi aperigis artikoleon por la legantoj de aliaj regionoj, informante, ke kompreneble la frakcio pretas solidariĝi al iu ajn soldatservrifuzanto, sed ke mi ne sukcesis havi iliajn adresojn. Poste mi havis alian ideon : mi aperigis la dekreton de Lenin permesintan al tiuj, kies religioj malpermesas partoprenon en milito, anstataŭigi la militservon per civila servo. Mi bone sciis, ke statuto por soldatservrifuzantoj ekzistas en neniu marksista-leninista ŝtato krom GDR, sed mi supozis, ke la cenzuristoj de tiuj ŝtatoj estos tre embarasitaj, ĉar efektive la dekreton subskribis Lenino mem, kaj mi menciis ĉiujn referencojn de la rusa originalo. (Mi neniam eksciis, ĉu tiu numero de LJP efektive atingis marksisman-leninisman ŝtaton).

Liberecana Ligilo

Kvankam mi estas la nura neateista membro de la frakcio, kaj kvankam ĉiuj aliaj tion sciis, oni konfidis al mi en Rijeka, per unuanima voĉdono (en SAT, la grandega plimulto de voĉdonoj estas unuanima, ĉar, se oni sukcesis trovi viktimon por ion ajn fari, lin aŭ ŝin oni tuj uzas). Bedaŭrinde mia subita eniro en psikiatrejon ne ebligis al mi plenumi tiun taskon. Nur du numerojn mi redaktis. Male de la pacistoj, la liberecanoj sendis al mi artikolojn. Do mi efektive povis plenigi la bultenon sen tro jakelinadi. Estis en ĝi artikoloj de mi, ĉar la fakto, ke mi redaktas la gazeton, ne senigas min je mia esprimrajto. Mi havis problemon pri cenzuro : Liberecana Ligilo ne estas kiel Laŭte! ĝenerala gazeto, sed gazeto, kiu havas precizan statuton : ĝi devas esti ligilo inter la liberecanoj de SAT, kaj ankaŭ konigi al aliaj esperantistoj la liberecanajn ideojn. Nu, mi iam ricevis desegnon de kaprino kun brusto de virino. Mi longe cerbumis,

kaj ne sukcesis trovi rilaton inter tiu desegno kaj la liberecanaj ideoj. Mi estis en la situacio de botanikisto, kiu ricevis artikolon pri elefantoj. Do mi skribis al la kamarado ke, se li akceptos, la desegno aperos ne en L.L. sed en LJP. Se li ne akceptus, mi tute ne scias, kion mi devus fari, ĉar kompreneble ne povas ekzisti liberecana cenzuro. Okazis ankaŭ, ke iu plendis, ke ne aperas en L.L. artikoloj pri temoj, kiujn li persone ŝatas. Mi aperigis la leteron de tiu k-do kun noto, ke se iu kompetentas pri tiuj temoj, li verku artikolojn pri ili, ke la redaktanto de L.L. ne estas enciklopedio de anarkismo, kaj ke mi promesas ne cenzuri eventualajn artikolojn de tiu kamarado. Ankaŭ al Kribo iu plendis, ke ne estas artikolo pri la atomcentralo de Golfech en Laŭte, kaj lia respondo estis simila. Okazis ankaŭ, ke artikoloj estis verkataj, ĉar tion mi petis de la verkonto.

Laŭte!

Mi kutimas sendi al Laŭte ĉion, kion mi ne povas sendi al aliaj E-gazetoj pro la elefant-botanika motivo. Mi demandas min (kaj lin), ĉu Kribo aludis al mi en sia frazo pri fakuloj, leŭtuloj aŭ "tradukmaŝinoj". Kompreneble, mi agnoskas al kontraŭjakelinistoj la rajton sin esprimi en Laŭte, kaj estas tasko de Kribo decidi, kion fari, se alvenas al li tro da materialo.

La principon, ke Laŭte ne havas cenzuron, mi tute aprobas, sed jen : ĝi ne estas aplikebla en Francio (kaj verŝajne ne en iu ajn alia ŝtato) : laŭ la franca leĝo, oni ne rajtas publikigi ion ajn, kaj gazeto devas havi respondeculon, kiu estas punebla, se oni publikigas ion ajn mallegan. Nu : estas leĝo, laŭ kiu oni ne rajtas insulti alilandajn ŝtatestrojn. Do, kio okazus, se mi sendus al Laŭte artikolon por esprimi mian opinion pri Jean-Claude Duvalier (tio estas nur ekzemplo, mi povus insulti multajn aliajn)? Jean-Claude Duvalier estas ja... (cenzurita de Jakelino mem), sed li estas ŝtatestro, kaj Francio havas diplomatajn rilatojn kun Haitio. Laŭleĝe, oni devus puni la legan respondeculon de Laŭte. Fakte tiu leĝo estas tute teoria : multaj gazetoj insultas ŝtatestrojn, kiuj tion meritas, kaj ne havas problemojn. Tiun leĝon uzis la dekstra registaro por ruinigi finance per monpunoj la gazetojn, kiujn ĝi ne ŝatis. Iam maldekstra eldonisto François Maspero petis de la franca registaro la oficialajn listojn de la insulteblaj kaj de la neinsulteblaj ŝtatestroj. Ĉar letero al la

prezidento de la respubliko estas senpaga, kiam mi havos tempon mi petos tiujn listojn de Mitterrand, sed, tiom longe, kiom li ne respondos (kiel estas verŝajne) tiuj, kiuj ŝatas scii, kion mi opinias pri Duvalier, Pinochet, Jaruzelski, ktp, ktp, bonvolu sendi al mi personajn leterojn.

Jakelino.

oooooooooooo

Kribo bone klarigis la preskaŭ specialan karakteron de "Laŭte!" kiel libera esprimo de la legantaro ekstere de organizoj aŭ fakoj en tuta sendependeco. Mi volas elekti du aliajn ekzemplojn de E-gazetoj, kies leganto mi estas, unu de fako : "ETNISMO", la alian de tutmonda asocio: "SENNACIULO".

ETNISMO estas gazeto de fako, kiu volas uzi E-on kiel komunikilon inter la malplimultaj lingvoj. Ĝi havas malmulte da anoj (80 el 34 etnoj) kaj aperas nur 4 fojojn jare, sed kun po 20 paĝoj (grandformataj), bone presita kun kolora koverto. La enhavo estas laŭ mi (kiu interesiĝas pri tiuj etnaj problemoj) sufiĉe riĉa kun dokumentaro pri la luktoj de popoloj malbone konataj kiel Papuoj, Indianoj de Peruo, ktp, bone ilustrita per mapoj, fotografaĵoj. Krom tiuj dokumentoj la gazeto donas koncizajn informojn pri la lokaj agadoj en diversaj etnoj tra la mondo. La legado de la gazeto estas agrabla : jen por mi ekzemplo de vivantigata gazeto. Ĉu tio venas de la redaktanto, kiu volas prezenti informilon sed ankaŭ belaspektan revuon ? Mi ne povas aserti, mi nur konstatas la fakton !

Aliflanke : SENNACIULO, kiu estas la oficiala organo de SAT, kun sufiĉe da membroj kaj strukturita organizado. Mi abonis al SENNACIULO antaŭ 30 jaroj proksimume kaj poste dum 15 jaroj mi forlasis la aktivadon en la E-movado. De du jaroj mi provis realiĝi al SAT kaj denove ricevis SENNACIULON; tute ne ŝanĝita, "eterna", kun la samaj rubrikoj en la samaj lokoj de la gazeto, la malgrandaj kaj naivaj desegnoj "ĉapelantaj" la rubrikojn... La ĝenerala aspekto de la gazeto estas proksimume tiel alloga kiel tiu de la "Franca Oficiala Gazeto". Mi ne povis diri, ke SENNACIULO estis vivanta gazeto, ĉar ĝi aperis kvazaŭ en tipografio kaj en la grafikaj rimedoj okazus nenia progreso dum 15 jaroj. Tamen el la enhavo estas sufiĉe interesaj artikoloj, sed ili malaperas en la grizaĵo de la tuto. Ĉu la grizaĵo spegulas la konservemon de la leg-

antaro ? Ĉu vigla redaktoteamo povas skui la polvon ?
La E-gazetaro vivas nur se ĝi evoluas foje pri la aktualeco de la enhavo, sed ankaŭ pri la aspekto de la prezentado, kiu eble donos al la legantaro la deziron sed ankaŭ la plezuron legi kaj poste eble kunlabori.

.....

J.G.

Kribo, Suzana, J.G., jam bone pritraktis la temon, klarigante la ĉefajn punktojn, por ke bone vivu gazeto.

Ke leganto iĝu kunverkanto devus esti unu el la ĉefaj celoj, sed tio ne estas facile trafebila. Ĉar ofte legantoj ne kuraĝas, ne sentas sin kapablaj, aŭ ne trovas tempon... Jes, amikeco, simpatio al respondeculo(j) de gazeto instigas al kunlaborado, sed multe pli instigaj estas la intereso al temoj debatitaj, la deziro sin informi, informi mem, kaj ankaŭ sciigo pri ellaborado de gazeto, laŭ la teknikaj, materiaj rimedoj. La redaktanto (aŭ redakcio) ne devas labori sola : necesas el diversaj lokoj helpantoj aŭ korespondantoj, kiuj respondecas pri specifa laboro : instigi surloke al verkado, "varbi" verkantojn, kolekti informojn, verki rubrikojn, tajpi artikolojn, desegni, ktp... Gravas, ke tiu "komitato" ĉiam zorgu pri sia anstataŭigo, tro ofte gazeto malaperas kun sia(j) respondeculo(j).

La gazeto ofte devas aperigi alvokojn kaj informojn pri la materiaj kondiĉoj, ekzemple tempo necesa por publikigi tekstojn, teknika problemo... Ĉiam devus esti lokoj por urĝaj anoncoj kaj aktualaj temoj.

E-gazeto devas esti internacia kaj speguli vivon de E-asocioj, informi pri agadoj, aperigi pripensojn, ideojn, opiniojn de esperantistoj. La gazeto estu malfermita al personaj esprimoj, la verkisto mem respondecu pri siaj verkoj (toleremo estas necesa tiel de redakcio kiel de legantaro).

Sed tiu organizado kaj malfermo ne sufiĉas ; necesas ankaŭ scii teknike "konstrui" gazeton. La redakcia komitato aŭ respondeculo respondecas pri la enpaĝigo de la tekstoj, eĉ se ili (li) mem ne presas. Presisto profesia devus nur teknike helpi, konsili, ne decidi pri la fina aspekto de la gazeto. Certe estas pozitive kunlabori kun presistoj, por ke la modernaj teknikoj helpu por igi pli alloga la gazeton. Tie aperas la financa kaj "peza" flanko de la vivkondiĉoj de eldonado. Mono ne mankas, se estas vigleco, volem, de E-asocioj aŭ individuoj : vivoj de gazeto kaj de E-grupoj estas aŭ devus esti ligitaj, reciproke ili sin helpas, ili estas "solidaraj".

Konklude, vivanta E-gazeto estas informilo, ligilo, esprimilo, "debatilo" kun diverstemaj tubrikoj fare de kiel eble plej diversaj verkantoj.

Nicole.

.....

Red. : Pro la hazardo ligita al la enpaĝigo, kaj tial ke la kontribuo de Jansebo devas nepre troviĝi vidalvide de liaj desegnaĵoj... bonvolu nun legi pri :

A. M. F. P.

(Franc-Palestina Medicina Asocio)

en la israela-palestina milito en Libano

De antaŭ sia kreado (dec.1974) AMFP konkretigis sian solidarcon kun la palestina popolo, senpere aliĝante al la sanitara programoj de "Ruĝa Krescento"...

...La 12an de julio, unua medicina taĉmento, konsistanta el du kuracistoj, unu kirurgo kaj unu flegistino, instaligis en okcidenta Bejruto. La 28an de aŭgusto, francaj gekamaradoj en dua taĉmento foraviadilis. La Ruĝa Kruco savis kaj rehejmenigis ilin la 24an de septembro, post eskapo el la Ĉatila masakro...

... Katastrofa estas la situacio post la forpelo de la PLO-trupoj. Komence de la vintro, la rifuĝintoj, sen ia ajn ŝirmilo, ege multnombriĝas. La "rastadoj" fare de la libana armeo (arestoj, elpeloj, detruado de nesalubraj kvartaloj) pluiĝas, eĉ multobliĝas. Pli kaj pli da familioj vagas, serĉante rifuĝejon.

Malaperis ĉiuj socialaj kaj sanitaraĵoj strukturoj starigitaj de la palestina popolo por pluvivi.

AMFP nepre devas reiri al Libano kaj solene vokas al ĉiuj samlandanoj (francoj), por ke finance ili helpu plenumi tiun humanan taskon.

Ni vokas ankaŭ al ilia konscienco, por ke ili kuniĝu kun ni en la komencanta lukto por tuj efektiviĝi aplikon de la Ĝeneva Konvencio. Tiu ĉi Konvencio malpermesas daŭran malliberigon de la medicina personaro kaptita dum milito.

De multaj jaroj, agnoskite de la plimulto el la internaciaj sanitaraĵoj, "Ruĝa Krescento" tutlibere devas praktiki ĉiujn proprajn aktivecojn interne de la palestinaj rifuĝantbarakoj kaj de la lokoj, kie ariĝas palestinaj loĝantaroj. Estas netolereble, ke en Sabra, Ĉatila kaj Borg el Barajneh, la medicinaj strukturoj de "Ruĝa Krescento" estis forigitaj, kaj ĝia personaro devigita forfuĝi por eskapi malliberejon, torturon, mortigadon.

Sola, aŭ kun aliaj asocioj, la palestina Ruĝa Krescento nepre rajtas esti je la sanitara servo de sia popolo.
 artikolo ĉerpita el "Solidarité Palestine",
 14 rue de Nanteuil, F 75015 PARIS. tr. Ginette.



- Skribu dense. Uzu longajn frazojn. Tio pruvas, ke la verkintoj havas multon por diri.
- Evitu malseriozaĵojn. Desegnaĵojn ekzemple, aŭ humuron, precipe trans la unua grado.
- Ne forgesi memori pri la statuto de via asocio : ĝi estas ĉefe pasiiga temo. Ankaŭ la bilancon de via asocio : la ciferoj ripozigas la legantojn post la tro tedaj tekstoj.
- Ne pritraktu tiklajn temojn : sekso, politiko, ktp.
- Se vi tamen esprimas politikajn ideojn, elektu malnovajn kaj jam provitajn. Ĉar oni ofte parolas pri ili en la naciaj gazetoj, tio helpas la komencantojn, kiuj ne mastras la lingvon.
- Neniam parolu pri estontaj eventoj - ĉar oni ne povas esti certa, ke ili okazos. Precipe kiam ili estas organizotaj de la aliaj asocioj. Tio estus malhonesto konkurenco.
- Prefere skribadu pri okazintaĵoj kaj ne forgesu la plej etajn detalojn, kiuj amuzas la legantojn (kiu donacis tri frankojn al la asocio, kiu pruntedonis globkrajonon...ktp).
- Ne forgesu la nekrologan rubrikon. Ĝi estas la plej viva parto de E-gazeto.
- Neniun foton!!! Tio aspektigan la gazeton neserioza. Sekvu la ekzemplon de la franca ĉiutaga "Le Monde", kiu neniam enhavas iun.
- Se vi absolute ne povas forigi ilin, ke ili aspektu bonordaj. Ekzemple, laŭlinie starantaj kongresantoj, kiuj atendas senmove la eliron de la birdeto...

Jansebo.

La venonta temo : "La Modo".

Se vi mem ne estas ĉenleterano, sed volas tamen proponi debaton pri iu temo, bonvolu sendi al la red. de "Laŭte!" vian proponon kun nepre, ekzemple 1-paĝa, enkondukita teksto. Nefranc(in)oj vi estas bonvenaj en la ĉenleteran sistemon! Ni devas nepre renovigi la skipon, por eviti la laciĝon de la kutimaj partoprenantoj, kaj la tedon legi ĉiam samdevenan prozon. Ankaŭ vi vivantigu vian gazeton !



VORTOJ DE MALJUNULO

— — —
valo
— — —

1910 - 20 - 40 - 60 - 80 ---

Mia avo diris al mi :

- Hodiaŭ ci finis la dekan jaron. Kiam ci estos dudekjara kaj fariĝos soldato, ni malŝtopos certan botelon, kiun mi konservas en la kelo por tiu speciala okazo.

Mia patro diris :

- Kiam li estos dudekjara li ne fariĝos soldato, ĉar tiam la armeo estos jam abolita.

Tiu dialogo okazis la 19an de februaro 1910.

Iom pli ol kvar jarojn poste, mia patro mem refariĝis soldato. En 1916 li kaŭris en tranĉeo apud Verduno, kaj estis vundita.

En 1920 la milito estis finita, sed la armeo ne estis abolita. Mi fariĝis soldato.

En 1940, dua mondmilito, ankoraŭ pli amasbuĉa ol la unua. Mi refariĝis soldato.

En 1960, francaj soldatoj militis en Algerio.

Pasis 1980, kaj la armeo plu ekzistas, ĉiam potenca kaj honorata. Ĉie potenca, kaj en multaj landoj la regantoj estas armeaj ĉefoj. Tamen, en la mondo estas unu lando, en kiu la armeo estas abolita : nome la respubliko de Kostariko.

Sen soldatoj, sen armiloj, ĝi vivas en paco inter najbaroj konstante skuataj de sangaj internaj militoj. Kaj ĝi dediĉas al la sanigado kaj al la klerigado de sia popolo la tiel ŝparatan monon.

Ĉu tiu saĝa regneto ne devus esti rigardata de ĉiuj popoloj en la mondo kiel ekzemplodona ?

Dume Francio, kiu laŭ tradicia famo ĉiam staris ĉe la pinto de la progreso, kiel lumturo lumiganta la mondon, la grandanima Francio fieras aparteni al la klubo de la atomarmitaj regnoj. Ĝi fabrikadas hidrogenbombojn kaj

konstruadas atomenergiajn submarŝipojn. Tio estas multekosta, sed ni estas riĉaj, kaj ni enspezas multe, vendante armilojn al la tuta mondo.

En Francio nun oni rajtas rifuzi la militservon, sub certaj kondiĉoj kaj kontraŭ kompenso de duoble longa civila nacia servo. Tio estas leĝo. Sed unu el la artikoloj de tiu leĝo specifas, ke estas malpermesate informi pri ĝi !

Jam pasis tuta jaro kun socialista registaro sub la signo de "ŝanĝo", kaj tiu hipokrita leĝo restas neŝanĝita. Ĉu necesos, ke dua Lecoin endanĝerigu sian vivon por vekti la publikan konsciencen ?°

Valo.

°)Louis Lecoin, nelacigebla batalanto kontraŭ milito kaj armeo, sub la regado de generalo de Gaulle faris heroan malsatstrikon, kiu certe influis por akceli la leĝon pri "konscienc-obĵetado".

Ni ricevis kaj mencias : PIKA! EN HIROŜIMA

50-paĝa bele bindita albumo el teksto kaj pentraĵoj de Maruki Toŝi pri la falo de la atombombo ("Pika" estas ĝia nomo en la japana lingvo) en Hiroŝima. Akompanas la albumon la traduko de la japana teksto en esperanto per 12-paĝa broŝureto. La aŭtorino, nun 70-jara, eniris en Hiroŝima-n tuj post la bombado kaj aŭdis kaj notis la rakonton de Minjo, tiam 7-jara knabino, kies familio estis viktimo de la atombombo.

La aldona broŝureto finiĝas per tiuj vortoj, kies celon ni povas nur aprobi : "Enpresu bildojn de la atombombo en lernolibro en la tuta mondo".

Prezo : 1200 jenoj. Mendu pere de k-do MINE Yositaka, Kitahama-Kitawaki 29-16, TAKASAGO, Hyogo-ken, 671-01 Jap.

NASRUDIN

"Mi povas vidi en mallumo", Nasrudin fanfaronis en la kafejo.

"Sed kelkfoje ni vidas vin kun lampo sur la strato."

"Nur por ke aliaj homoj ne trafu min."

Kris Long.



Ĉies voĉo

N A C I O

o o o o o o o o

En novembro Laŭte estis artikolo de Jakelino, en kiu ŝi aludas pri mi kiel sennaciisto. Unue mi volas precizigi, ke mi ne estas sennaciisto, almenaŭ se per tiu vorto oni kvalifikas personon, kiu tute aprobas kion proponis Lanti. La artikolo, kiun mi skribis en Sennaciulo, estis persona interpreto de sennaciismo. Laŭ ŝi, mi "opiniis ke la etnoj devas malaperi por plifortigi la ŝtatojn". Eble mi malbone klarigis mian opinion, sed mi diris nur ke estis bone, ke la etnoj aŭ regionoj restis post la revolucio kunigitaj en la sama regno Francio. Do vidu, mi estas iom naciisto. Sed, same kiel mi deziras unuecon de Francio, mi deziras ankaŭ pli vastan unuecon, eĉ mondan, se eble. Male al Lanti mi deziras tiun unuecon sen malapero de nacioj, sed en federacio aŭ asocio. Por tio ĉiu naciiano devus akiri konscion pri frateca homaro kaj ne plu havi egoisman naciismon, konsenti pri tutmonda organizado pri iu povo, kiu efektivigos internaciajn leĝojn demokrate elektitajn. Tio signifas konsenti malaperon de iom da nacia suvereneco.

Laŭ mi, Lanti estis tro krude kontraŭ nacioj kaj laŭ mi sennaciismo devus signifi la konsenton, la deziron al tutmonda ordo, sed lasante grandan memstarecon al ĉiu nacio. Plie, ĝi devus garantii la rajtojn de tiuj kolektivoj same kiel ĝi trudas devojn.

Alia afero estas la ŝtato. Se mi skribis, ke por Alzaco oni ne povas paroli pri nacio ĉar mankas alzaca ŝtato, tio estis por precizigi kion mi komprenas per nacio. Sed kiel por internacia organizado, ankaŭ por la nacia organizado mi ne estas por iu ĉiopova centralizita ŝtato, sed prefere por ke restu multe da memadministrado al ĉiu regiono aŭ etno. Do mi ne estas por malapero de etnoj aŭ regionoj, sed por ke, kiam ili estas unuigitaj kiel en Francio, ili restu unuigitaj en sama regno. Ĉu tio por plifortigi la ŝtaton? Ne, sed laŭ mi ili havas

pli da intereso esti kunigitaj ol apartigitaj. La ŝtato estas la aparato, per kiu la regantoj administras, estras la nacion laŭ la leĝoj. Sed la socio vivas ankaŭ en ekonomia sistemo kaj ĉe ni tio estas la kapitalista sistemo. La kapitalistoj havas grandan povon kaj ĝin ili uzas ankaŭ por ke la ŝtataparato estu je ilia servo. Eble vi diros, ke mi estas malfruiganta, sed mi plu kredas al la marka analizo. (Ŝtato: tuto de la trud- kaj punfortoj kaj sociorganoj, kiuj certigas al la superanta klaso regadon super la aliaj - PIV). Laŭ komunisma aŭ anarkiisma teorio tiu aparato devus malaperi se regus la laboristaro. Sed tion mi ne opinias, ĉar ĉiam oni bezonos iun administran aparaton, eĉ se oni ne plu nomos ĝin ŝtato. Tamen estas dezirinde, ke la organizita laboristaro agu, por ke ĝi ne plu estu je la servo de la kapitalistoj, sed de la tuta popolo.

Mia opinio estas, ke oni ne devas prezenti sennaciismon nur kiel trudan unuigon, sed kiel dezirindan organizadon kaj kunordigadon de la monda ekonomio, kunlaboradon, amikecon, per interkonsento de ĉiuj popoloj. Por pli facile atingi tiun celon la elekto de esperanto kiel komuna komunikilo estas necesa. La laboristaj sindikatoj jam organiziĝis internacie, ĉar la bonstato kaj laborkondiĉoj dependas ankaŭ de solidaro kaj unueca agado de la tutmonda laboristaro, ankaŭ la paco kaj sekureco. Por ke tiuj internaciaj organizoj fariĝu pli potencaj, necesas bona interkompreno kaj kapableco por agi. Por tio estus bone, se ĉiu laboristo estus konscia internaciisto aŭ sennaciisto. Antaŭ 1914-18 multaj laboristoj esperis, ke la internaciaj sindikatoj estos kapablaj organizi ĝeneralan strikon kontraŭ la milito kaj ĝin malpermesi. Sed la plimulto estis ankoraŭ naciista kaj ankaŭ la gvidantoj. Laŭ mi tio estas la kialo, ke Lanti ne fidis al internaciismo. La milito instruis per la suferoj kaj donis okazon cerbumi pri ĝia kialo. Do por kontraŭstari pli efike, necesas ke la internaciaj aŭ sennaciistaj organizoj estu pli potencaj. Estus dezirinde, ke la plimulto konvinkiĝu pri tiu neceso. Per esperanto ni povas helpi, kaj per tiu sinteno ankaŭ bone propagandi por esperanto.

Laŭ mi oni ne rajtas diri sin tute fidela al Lanti kaj misprezenti lian teorion, sed oni rajtas diri sian propran opinion kaj pensi, ke ĝi kongruas kun lia intenco trovi iun rimedon por ke la homoj vivu pace kaj fratece.

J. Petro ORLIANGE.

Pri nacioj kaj naciismo

Nacioj kaj naciismo povas esti bonaj aŭ malbonaj aferoj : se temas pri muziko, dancoj, kostumoj, kantoj kaj literaturo (necesas traduki), bone kaj riĉige por ĉiuj... sed se temas pri preteksto por eksciti al terorismo, milito, amasmurdoj, homekspluatado, nov-feŭdismo... malbone kaj malriĉige por la plejmulto, eble bone kaj riĉige por kelkiuj.

P.M. -G.

Pri "broŝuroj"

Vere "iĝi" estas bonegaj "poŝlibroj", ne estus atenco kontraŭ la Fundamento iom ŝanĝi la nomon. La tuta E-a movado stagnas pro troa konservemo.

P.M. -G.

Pri propagando de E-o

E-o estas progresema afero, do la propagando devas celi progresemajn. Nu, E-o havas alfabeton el la epoko de mana skribado kaj kompostado, mezurojn ĉefe el la Mez-epoko, nombrojn el la ĉina antikveco, pronomojn kaj finaĵojn laŭ Biblia modelo. Antaŭ ol propagandi necesus iom evoluigi la lingvon. Komprenu ne ŝanĝi nek reformi, nur iom post iom evoluigi laŭ la nuntempaj ideoj kaj bezonoj. Anoncoj tiaj, ke : "E-o permesas sensupersignitan alfabeton por ordinara komputiloj kaj Skrablo-" "E-o arkaismigas la nemetrajn mezurojn"...ktp, estus pli efika propagando ol ripetadi : "E-o estas genia", "E-o estas perfekta", "Nova komputilo tajpas cirkumfleksojn de E-o", ktp, kiam ĉiuj scias, ke Z. mem parolis pri siaj eraroj, konsilis evoluadon dum ĝi ne malebligas la legadon de la pratempa literaturo.

Ne diru, ke evoluo ne utilas, ke Ido kaj aliaj fiaskis, mi nur donos la ekzemplon de la Latina, kiam oni anoncis ke estis oficiale adoptita internacia prononco, la nombro de lernantoj kreskis de 80 000 al pli ol 400 000, nur en Francio !

P.M. -G.

NASRUDIN

Nasrudin ŝarĝis la azenon per brul-ligno, kaj ek-sidis sur ŝtupo, ne sur la selo.

"Kial vi ne sidas sur la selo?", iu demandis.

"Ĉu aldoni mian pezon al la ŝarĝo? Mi ŝarĝas nur la lignon, ne la beston."

Kris Long.

NE TRETU LA ROZBEDOJN SEN NEPRA NECESO !

El la plumo de Daniel LUEZ aperis en la lasta numero de "Laŭte!" jena apostrofo al François MITTERRAND : "Kaj viaj promesoj, sinjoro Prezidento?" La verkinto klarigas, ke la kandidato MITTERRAND skribe promesis, ke kiel prezidento li subtenos Esperanton kaj nun perfidas siajn naivajn elektintojn.

Nu, kion ĝuste promesis F.M.? Jen citaĵo el lia respondo al letero de Henri MASSON, 13.4.1981. "Miaj parlamentaj amikoj deponis dum la lasta sesio de la Nacia Asembleo leĝproponon celantan enkonduki la internacian lingvon Esperanto en la duagrada kaj supera lernejoj kiel elekteblan studobjekton. Se la ge-Francoj konfidus min, (s.k. se mi estos elektita), mi petos de la registaro, ke ĝi submetu al parlamenta voĉdono tiun leĝproponon." Li promesis nur tion, ne pli. Jen fakto.

Intertempe kadukiĝis la aludita leĝpropono. Komence de novembro kiel multaj mi skribis al la prezidanto de la socialista grupo, Pierre JOXE, ke lia parlamenta grupo deponu novan samcelan tekston. Mi ĵus ricevis respondon : S-ro André Delehedde, socialista deputito de Pas-de-Calais, deponos leĝproponon spirite konforman al tiu de la 19.12.1979. Jen alia fakto.

Nun mi atendas la sekvon t.e. unue, ke nova teksto aperu, due, ke prezidento MITTERRAND ebligu ĝian parlamentan diskuton kaj baloton. Jen la faktoj. Ĉio cetera estas nur fantaziaĵo kaj agreso senbaza.

Paul SIGNORET.

Reĝustigo pri sensenca, superflua kaj senutila deklaro.

Jen kion estis eble legi en "Laŭte" n°45 : "Sensekva polemiko - En n-roj 40,43,44 de Laŭte ekestis polemiko pri "anarkismo kaj aŭtokratismo" inter mi kaj anonima B.G.D. La ĵus verkitaj argumentoj de B.G.D. estas tiel fantaziaj (ĉar mi deziras resti afabla...), ke ne estas eble serioze diskuti. Pro tio mi ĉesigas, pri tiu temo, daŭron de diskutado." YVES PEYRAUT.

Tia "Sinjora" deklaro, kiu nur pravigas mian antaŭan aserton, ke proklamante : Nek Dioj! Nek Mastroj! la anarkiistoj faras sin dioj kaj mastroj, kaj mem decidis pri la "fantazieco" de alies opinioj aŭ pri la ekzistaro de aliaj homoj, ĉu individuoj, ĉu kolektivoj, tia deklaro ne indas respondon en SAT-rondo. Mi ja opinias la SATanojn sufiĉe konscie maturaj por mem ĝuste taksi ĝin.

Mi do ne respondos sed nur reĝustigos tiun falsecan deklaron.

Sekve de letero sendita al mi de anarkiista k-do, kiu petis min pri klarigo rilate Socianismon, mi mem petis k-don Kribo aperigi en "Laŭte" n°40 mian respondon al tiu k-do (kiu ne estas k-do Y.P.), kiel "Malfermita respondo al Anarkiista k-do", cele ke aliaj k-doĵoj ne same misopiniu pri mi.

Sekve de tiu "Malfermita letero", k-do Y.P., pri kiu mi neniam aŭdis antaŭe, petis min en "Laŭte" n°43 pri klarigo rilate ian koluzion anarkiismo-aristokratismo, mi do respondis en "Laŭte" n°44 eksponente tute malkaŝe mian propran koncepton pri anarkiismo.

Ĉar k-do Y.P., anstataŭ refuti mian argumentadon, nur elmetis la ĉisupran "Sinjoran" deklaron en "Laŭte" n°45, polemiko inter li kaj mi ne ekzistis kaj ne ekzistas : polemiko estas skriba publika diskutado, kaj diskutado estas ekzamenado de opinioj ; ĉar k-do Y.P. rifuzas diskuti, polemiko ne estas.

Kaj proklamante, ke li "ĉesigas, pri tiu temo, daŭron de diskutado", kiu fakte ne okazis, k-do Y.P. nur vane baraktadas en malluma vakuo, provante per superflua, sensenca kaj senutila "Sinjora" deklaro maski sian nekapablecon respondi aŭ sian timon esti devigata forlasi, pro Vero, la lulecajn iluziojn de anarkiismo.

El ambaŭ ni, kiu efektive fantazias ? La legantoj de "Laŭte" mem juĝos.

Anonima B.G.D.

(por la neŭbakitoj) alie : Benjameno Gabrielo DELALOT, SAT-ano de 1946. M-ulo 21758. Loĝas en "La Fera Ĉerko" 10, strato de Serres, F 24500 EYMET.

"CI" FUNDAMENTA VORTO

K-do Passarella demandas, ĉu "ci" estas franca dialekto ?

"Ci" estas nek dialekto, nek slango, nek neologismo. En la "Fundamento" tiu ĉi vorto indikas la duan personon singulare. En "Lingvaj Respondoj" n°87 mi legas : "La plej bona maniero kompreneble estus, se ni al pli-ol unu personoj dirus "vi" kaj al unu persono ĉiam "ci"... "ci" ŝajnas al ni eble ofenda...". Rimarku en la lasta frazo la vortojn ŝajnas kaj eble. El tio mi sugestas, ke Zamenhof tute ne opiniis, ke "ci" estu ofenda, ĉar li daŭrigas : "Por la personoj, kiuj tre sentas la bezonon de "ci" (ekzemple, kiam ili sin turnas al Dio kaj al am-

ata persono)...". Do, ĉu estas nur permesite ofendi al Dio kaj al amata persono ?

Ankaŭ mi legas el "Fundamenta Krestomatio" paĝo 396an, el poezio "Versaĵo sen fino" de Feliks Zamenhof :

Ekamis la konato
Kaj reciproke ŝi ;
Post paso de monato
ŝanĝiĝis "vi" per "ci".

Lina Gabrielli en "Karnavalo" p.16a : "...fare de miaj genevoj. Ili min vokis : Onklino, kiel longe vi dormas! Leviĝu, ĉar ni volas amuziĝi kun ci!" En tiu frazo oni povas observi la trudon de la lernata "vi" kaj la timeman ekaperon de la korsenta "ci".

Ni revenu al "Lingvaj Respondoj" n°86 : "Vi ni diras egale al unu persono aŭ objekto kaj al multaj ; tio ĉi estas farita pro oportuneco..." Tio eble estis oportuna je 1888, sed ĉu de tiam nenio ŝanĝiĝis ?...

Mi opinias, ke la problemo naskiĝis de la traduko de "ci". Kelkaj donis aĉan sencon al tiu pronomo, laŭ sia lingvo, kaj la aliaj lingvanoj, kiuj kutime uzas "ci" kiel amikecan kaj normalan pronomon akceptis ĝin pro oportuneco, ĉar la burĝa etoso fine de la lasta jarcento, kutimis vi-diri. Tiu moro ŝanĝiĝis kaj en multaj landoj oni ci-diras inter familianoj kaj amikoj, eĉ inter simplaj konatoj. Mi preferas deklami kun Jacques Prévert :

Ne koleradu kontraŭ mi
Se mi cidiras al ci.
Mi diras ci al ĉiuj, kiujn mi amas
Eĉ se mi nur unu fojon vidis ilin ;
"Ci", al ĉiuj kiuj reciproke sin amas
Eĉ se mi ne konas ilin.

Espartako GABALDA.

P R I "C I"

Najbarino mia ĵus dungis junan tag-servistaron por helpi ŝin en mastrumado.

Kaj, - ĉu strange? skandale? aŭ komike? - la junulino, kiu estas Marokanino, diras "CI" al la estrino, dum tiu ĉi respondas per "VI" !

"CI" ekzistas efektive en la Fundamento. Sed Zamenhof mem klarigis la ĝenojn, kaŭzitajn de la uzado de ĝentila pronomo kaj konkludis : "por forigi ĉiujn ĉi tiujn embarasojn, ekzistas nur unu rimedo : diri al ĉiu, al ĉiuj kaj ĉio nur VI" (laŭ PIV).

Kiam kaj kiel naskiĝis ĝia uzado en Francio? Post 1936 kaj tuj post la milito floris la movado "Junulgastejo", en kiu entuziasme la junuloj renkontiĝis, laboris, kantis, kaj evidente uzis inter si la "TU" (=ci). Ne malmultaj estis inter ili nove bakitaj esperantistoj; ili ne povis imagi, ke en E-o ili dirus "VI" (=vous) al amikoj, kiujn ili ci-diras en la franca, eĉ se temis pri ĝentila VI.

Kaj tute same, tiuj junuloj aliĝis plej ofte al SAT, kaj ili enkondukis ilian "CI" en tiun medion.

Sed personoj kiel mi, fariĝinta esperantisto en 1930, kaj ne plu sufiĉe juna por aliĝi al la movado "Junulgaŝtejo", daŭre uzis "VI" kaj neniam povis adaptiĝi al la ĉi-umado.

Kaj mi, aŭdante "CI" de la buŝo de amiko/kamarado, ne povas fari alion ol respondi "VI". Ĉu strange? skandale? aŭ komike? Almenaŭ mi povas aserti, ke tio nedubeble kreas ĝenon en la konversacio! Por fini, mi konfesas, ke mi ĉiam diris "TU" en la franca al mia kunulino/edzino, sed "VI" en Esperanto!

Mi apenaŭ aludos pri la ne-belsoneco de la vorto, kiu kakofonie efektas en esprimo kiel, ekzemple: "Ĉu ci ŝanĝiĝis tiom, ke mi ne rekonas cin?". Kaj por ofendi neniun.... Sincere via/cia/via/cia...

kaj amike al ĉiuj! LENTAIGNE.

VORTINFLACIO kontraŭ RAJTO AL KOMPREENO

Estas tro da vortoj en Esperanto! Neniu povas ĉiujn ilin koni! La kunikla multobligado de E-radikoj babeligas la lingvon, kontraŭe al la celo de D-ro Zamenhof, kiu volis ke E restu lernebla de ĉiuj!

Mi proponas, ke oni draste limigu la nombron de lernendaj radikoj en Esp-o (inter 1000 kaj 2000), por ke ĉiu esp-isto kapablu ilin kompreni kaj uzi. La aliaj vortoj estos tamen permesataj, sed ilia uzo sekvas specialajn regulojn. Praktike, sufiĉas aperigi liston de nepraj fundamentaj vortoj.

- Vi malriĉigos la lingvon!
- Al kiu utilas nekomprenataj vortoj? Prefere bone konataj vortoj, ol multe da misuzataj.
- Malfacilas al mi sisteme eviti miajn kutimajn vortojn, kiuj ne estas en via listo.
- Tiajn vortojn oni ne malpermesos. Sed ili iĝos "literaturaj" aŭ "fakaj" vortoj. Dependas de via celo:

Por trafe komuniki, uzu la bazan vortaron. Por nuance esprimi vian penson en libroj tiaj, ke la legantoj prenu tempon por legi ilin, eĉ helpe de vortlibro, uzu literaturajn vortojn. Same por interŝanĝi ideojn kun samfakulo, uzu specialajn vortojn ankaŭ de li konatajn.

En ĉiuj kazoj, la situacio estas klara. Sed se vi uzas malsimplajn fakajn vortojn nur por superi iun en diskutado, via kontraŭulo RAJTAS peti, ke vi parolu pli simple kaj havas RIMEDON por kontroli tion. Tamen, se vi nepre bezonas malsimplan vorton, estus ĝentila ĝin difini inter parentezoj aŭ en piednoto.

- 1000/2000 vortoj ne sufiĉas.
- La unua projekto de E enhavis 1500 vortojn. En la lingvo "Basic English", 950 vortoj sufiĉas. Konfesinde, ĝiaj uzantoj (intoj?) devas fari pli longajn frazojn.
- Ĉu vi malpermesos neologismojn?
- Male. Sed konsekvence la tro malofte uzitajn vortojn oni forigos kaj ili iĝos "malnovcaj" vortoj.
- Ĉu estas plia reformprojekto?
- Ne temas pri reformo. La fundamento enhavas 16 gramatikajn regulojn. Neniu temas pri elekto de la radikoj. Regulo 15 indikas kiel esperantigi "fremdajn" vortojn, sed ne kiel ilin elekti. Ĝi ne ebligas decidi, ĉu vorto estas esperanta aŭ ne. Do limigado de la vortaro ne tuŝas la fundamenton.
- Kiu faros la liston?
- La Akademio de Esperanto. Sed la evoluadon de la lingvo ĝi devas TUJ sekvi. Feliĉe nuntempe oni disponas pri komputiloj, kiuj ebligas fari rapide statistikojn por aldoni la plej ofte uzatajn vortojn kaj forigi (kaj anstataŭigi) la plej malofte uzatajn.

Dank'al tiu plibonigo, E povas eviti la "heksagonan" degeneradon de la franca lingvo (t.e. amasiĝon de laŭmodaj vortoj, kiujn plejofte oni ne scipovas uzi korekte). Esperanto devas konservi siajn kvalitojn de komunikilo kaj ne imiti naciajn lingvojn, kun vana espero, ke tio igu ĝin pli "natura". Ĝi devas resti lernebla kaj komprenebla de ĉiuj homoj de la Mondo.

JANSEBO.

Nota de la red.: Jen interesege temo! Bonvenon al ĉies opinioj...tiel al ortodoksaj, kiel al neortodoksaj!

PRI LA "PACO-LIBRO"-ASOCIO

Bernard Benson, verkinto de la "Paco-libro" nun sin dediĉas al "Pac-Bird" a operacio : vojaĝo de infanoj irantaj de landoj al landoj por transdoni mesaĝon pri paco kaj multflanka malarmado.

La aviadilo ? Ĝi estas donaco de anonima usona firmo !
La benzino (keroseno) ? Donaco duone de Israelanoj duone de Araboj. Soveta mono firme kaj ĝentile estis rifuzita.
Brave al la "Paco-Libro"-asocio !

Kia ŝanco havi je sia dispono tian helpmonon ! Tamen la politika sendependeco de B. Benson ŝajnas al mi iomete pridubinda. Li preferas la dolaron kaj eble la petrol-dolarojn !

Se la "Peace Bird" fruigus sian vojaĝon, ĉu la masakroj de Sabra kaj Ĉatila ne okazus ? Ĉu ĝi malebligus la rast-operaciojn faritajn de la multnaciaj kaj libana armeoj en la palestinaj rifuĝantbarakaroj ? Nu! Sufiĉe da kalumnioj ! Ni estu optimistaj, ĉu ne ?

Eble, ni plezuriĝos, rigardante ĉe la televido Prezidentajn Moŝtojn saltigi la infanetojn sur siaj genuoj ! Tio anstataŭos la neaperon sur la ekraneto pri la 7a pacista internacia marŝado en Andaluzio, pasintsomere.

Tie okazis granda spektaklo. Oni vidis policistojn plene funkciantajn, militistojn en ĵipoj, fajrosoldatojn kun ilia incendi-ŝprucigilo, klabadojn, arestadojn. Tiuj ĉi kuraĝaj gekamaradoj ne estis helpataj de la dolaro !
Verdire, ili tro proksimiĝis al la NATO-bazoj. (Por pli da informoj, legu la oktobran numeron de la gazeto de Franca Pacista Unuiĝo.)

Ĉu ni povas paroli pri paca mesaĝo kaj multflanka malarmado, kiam miloj da estaĵoj laŭdire homaj kaj humanaj konsentas labori favore al la milito ? Fine, ni ne povas ri-proĉi al B. Benson, tiu ĉi dolĉanima revulo, ne esti pacifisto !

Ginette.

KIOM FAKTE KOSTAS SENLABORULO ?

La "ŝtato" reprenas de li 50% el lia lupago, t.e., ke la senlaborulo pagas duoble la luprezon. La realan koston de elektro li pagas "nur" 30-oble, 10- ĝis 20-oble la realan koston de la akvo, kiun li trinkas aŭ uzas por lavi sian korpon aŭ siajn tolaĵojn, la benzino 10-oble, 10- ĝis 25-oble la realan koston de la fervoja bileto, kaj

tion faras la ŝtato sen aĉeti novajn terenojn aŭ konstruigi novajn liniojn. La tabakon la ŝtato pagas jel' prezo de pajlo. La vinon ĝi taksas kiel ĉampanon. La poŝto plialtigas sian tarifon sen dungi pli da poŝtistoj kaj reduktante sian leterservon.

La "ŝtato" ja reprenas la tutan monon, kiun ĝi elspezas por la senlaborulo. Tial ne necesas kredi, ke la ŝtato bezonas malgrandigi la senlaborecon. Ĉiuj ŝtatestroj, se ili pensas pri senlaboreco, nenion povas fari por ĝin elimini.

Tial mi demandas min, ĉu ne estus eble vivi sen mono, eble eĉ sen ŝtato ?... Tion ni kredas malebla unuavide, sed tio devas esti ebla, laŭ la ĉi-supraj faktoj...
Kion fari ?

-nn-

KIEN... LA IMPOSTOJ ?

En Bordojo impostpagantoj grupiĝis por montri sian mal-konsenton pri la uzado de impostoj por la registara militpolitiko. Fakte, tiu ĉi daŭrigas la perfektigadon de nia detrua potenco. Interalie, ĝi preparas la konstruadon de sepa nuklea submarŝipo, ĝi plu "poluras" la neŭtron-bombon kaj aprobas la multnombrajn eŭromisilojn. La militbudĝeto, kiu pli kaj pli kreskas, faras grandegan elprenon en ekonomia sistemo, dum la sociaj problemoj pli kaj pli graviĝas en Francio kaj en la Tria Mondo.

Paralele, oni komplete neglektas la eblecojn, kiujn povus proponi la popola defendpolitiko, inkluzive la aktivajn metodojn por neperforta kontraŭstaro. Tiuj impostpagantoj, kiuj konsentas pri la sindefenda neceso kaj la imposta principo, tamen asertas sian respondecon kaj decidis ne plu pagi impostparton al la impostkolektisto, sed pagos ĝin al movado, kiu esploras aliajn sindefendajn manierojn, kiuj respektas la vivon, ekzemple al "M.A.N." (Mouvement pour une alternative non-violente)°

Ili ligiĝas kun la "Nacia movado por imposterfuzo kaj redisdono" ; ili intencas ĉesigi tiun agadon nur kiam

° = Movado por Alternativo Neperforta. Vd. la broŝuron "Politika Neperforto", disponeblan ĉe SAT-Broŝurservo. (Ndlr)

la registaro rezignos sian projekton konstrui la sepan nuklean submarŝipon. Ili esperas, ke venos kun ili ĉiuj, kiuj ne plu volas resti silentaj kunkulpuloj de ruiniga kaj memmortiga politiko.

Nicole Demontoux.

TRI NAJLOJ (↓ ↓ ↓)

Tri najloj Lin fiksas sur kruco ;
Tri najloj martele ŝovitaj
Tra l'membroj kun sanga elŝpruco
El histoj brutale ŝiritaj.

Tri najloj el kruda feraĵo,
Tri najloj kompakte rezistaj,
Tiritaj el rufa ercaĵo
Per zorgo de manoj artistaj.

Tri najloj al kiuj Li celis,
Tri najloj efike detruaj,
Al kiuj Lin fido trudpelis
Pro novaj alceloj kongruaj.

Tri najloj nur kataliziloj,
Tri najloj por uzo konsterna,
Forĝitaj de "lumaj la filoj"
Por igi la vivon eterna.

Tri najloj sur la kalvario,
Tri najloj oficas por morto,
Dum plore funebras Mario
Pro akra l'amaro de l'sorto.

Tri najloj kun kruc' kaj martelo,
Tri najloj utile ne perus
Se Kristo pro prava ribelo
Al morto sin mem ne oferus.

Tri najloj... kaj frapas martelo,
Kaj vibras la "ligno ebena",
Dum fuĝas espera la stelo
Trans densa mallumo finsvena.

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

En EYMET 1982/12/20

B. G. D.

Se turismo signifas viziton de aliaj lokoj aŭ landoj, sufiĉas iri al la plej proksima vojaĝagentejo kaj "aĉeti" vojaĝon. Eĉ ne necesas paroli alian lingvon, ĉar akompanantino klarigos al vi la tuton se vi estos sciemulo. Se turismo signifas renkonton kun aliaj homoj, aliaj popoloj, tiam Esperanto havas nekompareblan rolon. Bedaŭrinde tio ofte okazas kadre de renkontoj, kongresoj kaj ne permesas vidi kiel homoj vivas. Ni do profitu la jam ekzistantajn servojn (delegita reto, pasporta servo, tutmonda adresaro...) kaj la E-okazontaĵojn por bone "turismi" dumferie.

Prefere ni ne "konklavu" kaj ne restu inter Esperantistoj, se ni deziras pruvi al la publiko la praktikan utilecon de nia lingvo.

Se vi posedas veturilon (kaj prefere sed ne necese tendon aŭ ruldomon), ni povus kune viziti aliajn landojn, ekzemple en '83 centran Eŭropon kun eventuala vizito al la U.K. en Budapeŝto. Vizitoj ne estus rezervotaj al kasteloj, katedraloj kaj similaj sed al konatiĝo kun homoj kaj la lokoj kie ili vivas, laboras, sin distras... Kompreneble neniu financa aliĝo estas postulota kaj eblos partopreni nur kelkajn tagojn aŭ 1 semajnon, kuniĝi al la grupo kaj lasi ĝin kiam oni deziras.

Nur necesas scii anticipe kiu partoprenos kiam por serioze organizi la vojaĝon. La vizitotaj landoj estos tiuj kie E estas populara kiel Hungario sed ankaŭ tiuj kie ĝi ne estas favorata (Britio-Francio) aŭ preskaŭ nekonata (Nord-Afriko).

Por 1983 mi proponas : en Julio, foriron el Gray (la 15an), 1 semajnon en Svisio, 1 en Okcidenta Germanio, 1 en Aŭstrio, 1 en Hungario. En Aŭgusto : 1 semajnon en Hungario aŭ Aŭstrio, 1 en suda Pollando, 1 en Orienta Germanio, 1 en Okcidenta Germanio kaj la unuan semajnon de Septembro en Orienta Francio (Alzaco).

Pro la bona reto de aŭtovojoj en Germanio, estas facile kuniĝi aŭ reveni je iu ajn dato. Detaloj de la vojplano estas diskutotaj kun la interesatoj.

J. HENIN

F 48500 La Canourgue.

Novajo el Italio



"SALPINGODEVIIGO - ĈU NEPORĈIAMA STERILIGADO ?"

estas la titolo de artikolo, kiun mi legis en la decembra n-ro de "DUEPIU" (=du-plus), itala revuo por la (juna) paro. Mi sendas resumon, ĉar eble la novaĵo interesos la Laŭtulojn posedantajn amoremajn pur-rasulin-ojn, kaj dezirantajn praktike subteni la sciencan esploradon.

La franĝoriĉaj salpingoj estas la delikataj transport-organoj, kiuj kaptas la ovolon "naskiĝintan" el ovario kaj traŝovas ĝin en si ĝis la falo en l'uteron : ili estas aktivaj organoj, ne nuraj tuboj !

Por steriligi inon, la ĥirurgo nun fortranĉas parton de la povra salpingo aŭ strangolas ĝin per netrairebla maŝo. La salpingo preskaŭ ĉiam perdas sian funkciivon pro la traŭmo, do la operacio estas porĉiama.

Jen la novaĵo : Profesoro Iginio TERZI (Iĝino Terzi), estro de la obstetrika-ginekologia fakto ĉe Hospitalo "Maria Vittoria" en Torino, asertas, ke li longtempe eksperimentis super bestinoj novan teknikon, kiu, ne damaĝante la salpingojn, estas inversigebla, kion li fakte pruvis kun la nomitaj bestinoj. (La artikolo ne diras, kiaj estis). Poste, li proponis salpingodeviigon al virinoj steriligitaj. Unu jaron post la operacio, la salpingoj de la pacientinoj estis ankoraŭ perfekte funkciivaj, tamen, ĉar neniu el ŝiuj ĝis nun deziris salpingo-relokigon, li ne povas finpruvi la bonecon de sia



tekniko. Ambaŭ operacioj estas tre simplaj kaj daŭras duon-horon, sub kompleta anestezo.

- ① La salpingo estas kunigita al la ovario per ligamento tre facile "dekroĉebla" kaj "reakroĉebla".
- ② Per okul-operaciiloj la ĥirurgo dekroĉas la ligamenton kaj disigas la salpingon kaj la ovarion. Poste, ĝili enfermas per neasimilebla sutur-fadeno la salpingon en "poŝon" de la peritoneo (dika membrano envolvanta la ventr-organojn) ③④.

Por eventuale reloki la salpingon, ĝili simple tranĉos la suturerojn, rekroĉos la ligamenton al la ovario... kaj via katino regalos viajn okulojn per belega idaro! Tamen, ni esperu, ke oni inventos kontraŭkoncipilon sekuran kaj nedanĝeran, kaj por la homoj kaj por la bestoj. Ĝis tiam, vere inversigebla steriligo (se ĝi pruviĝos efika kaj nedanĝera) estos eble la malplej granda malbono por tiuj, kiuj ne volas/povas regi mem sian fekundon.

Gisella Marchioni

En Francio, antaŭ kelkaj semajnoj, kaj eble unuafoje ĉe la oficiala radio, dissendo estis dediĉita al vasektomio, t.e. porvira steriligado. Parolis fakuloj. Aŭskultantoj povis telefone demandi. Tiu operacioto ŝajnas al mi ankoraŭ malpli danĝera ol la salpingodeviigo, pri kiu temas ĉi-supre. Jam de longe okazas vasektomioj. Kial en iuj landoj oni sisteme prisilentas tion ? Dume, oni plu disvendas pilolojn, neinversigeble steriligas inojn, ŝajne evitante zorgojn al la kompatinda viraro...

Kribo.

Rebato :

K I O N V O L A S A T I N G I P. L. O. ?

La artikolo de samideano J.G. publikigita en la 45a n° de "Laŭte!" defias min reagi laŭmerite. En mia publika letero, pro manko de spaco, mi ne povis pli detale pri-trakti la t.n palestinan problemon ; tion mi provas fari nun, plejeble koncize kaj laŭ mia sincera konvinkiĝo.

Fariĝis jam kvazaŭ aksiomo, ke iu popolgrupo nomita palestina, batalas por akiri al si suverenan teritorion, kiun ĝi ne havas. Tiu ĉi supozo estas neĝusta, eĉ duoble. Fakte ekzistas ne unu, sed du sendependaj palestinaj ŝtatoj, starigitaj sur la teritorio de la historia Palestino. La unua - Okcidenta Palestino, etendiĝanta inter Mediteraneo kaj rivero Jordano, alinome Israelo, la antikva kaj renovigita hejmo de la juda popolo. La dua, teritorie pli ol trioble pli granda Orienta Palestino, Transjordanio aŭ simple Jordano, kreiĝis antaŭ 60 jaroj sub brita mandato poste sub gvidado de la Haŝemida dinastio.

La artikolverkinto J.G. inkluzivas PLO-on en la saman kategorion kun la armena, irlanda, vaska, alĝeria, eĉ iama juda terorgrupoj. Sed diference de PLO, ĉi-lastaj havis aŭ havas limigitan celon, neniu el ili strebis al neniĝo de Turkujo aŭ Britujo, Hispanujo aŭ Francujo. La malkaŝe deklarita, eksplicita celo de la arabaj teroristoj, male, estas starigo de plia (nombre 22-a!) araba ŝtato sur la ruinoj de Israelo, do ne apud, sed anstataŭ ĝi. Arafat pretendas kredigi al naivuloj, ke lia celo estas fondi "demokratian, sekularan palestinan ŝtaton, en kies kadro ĉiuj popolgrupoj vivus en plena egalrajteco" (kie ekzistas tia modela ŝtato en Arabujo ?). Ĉio ĉi povus efektiviĝi post la forpelo de la juda loĝantaro emigrinta post la Deklaro de Balfour (1917), laŭ la ekstremuloj, aŭ post 1948, laŭ la "moderuloj". Ne necesas diri, ke neniu mense sana israelano pretas akcepti tian programon, kaj nenia kompromiso povas ekesti kun tiaj doktrinoj.

La tragedio de la juda-araba konflikto kuŝas en tio, ke dum la juda flanko (almenaŭ ĝis 1977) estis gvidata de moderuloj, kompromisemuloj, la araban starpunkton karakterizis fanatika ekstremismo. Tiuj malmultaj, kiuj aŭdacis kontakti kun la judoj cele al intertraktado, estis sisteme likviditaj. Tia sorto trafis ankaŭ Reĝon Abdallah el Jordano (la avo de Hussein), la egiptan prezidenton Sadat, kaj la elektitan libanan prezidenton Baŝir Ĝumajel.

(fino p. 35)

laŭtaj informoj kaj petoj

ESPERANTO-MOVADO en ĜIRONO (Hispanio)

La E-grupo el Ĝirono havas la plezuron informi al ĉiuj, ke ekde Oktobro la grupo oficialiĝis kiel "ĜIRONA ESPERO". La E-kursoj pludaŭras ankaŭ ĉi-jare.

La 28an de oktobro ĝis la 7a de novembro, okaze de la jara ĝirona Foiro, la E-grupo havis fakan budon ĉe la kultura zono senkoste dank'al la urbestro. La buso estis tre bele aranĝita kun du grandaj flagoj : la verda sur la flavaj kaj ruĝaj strekoj (el Katalunio).

Tiu ekspozicio havis sufiĉe da vizitantoj por varbi kelkajn novajn gelernantojn.

Baldaŭ Radio Ĝirono dissendos ĉiusemajne E-programon, E-novaĵojn kaj etajn E-lecionojn. Ankaŭ Radio Olot kaj "L'Oloti" (revuo de tiu urbo) dissendis kaj publikigis respektive saman temaron kun granda sukceso.

C. LLAPART.

INTERNACIA EKSPOZICIO PRI INFANA ARTO

En Eysines (antaŭurbo de Bordozo, F) de la 6a ĝis la 14a de novembro, la E-fako de la Laika Amikaro kun helpo de la urbestro prezentis parton el la artaĵoj ekspoziciitaj en Cenon dum la lasta monato majo (vd. "Laŭte" 43). Tiu ĉi ekspozicio konsistis el tri centoj da verkaĵoj el 31 landoj kaj kvindeko el la lernejoj de Eysines. 30 klasoj kun ties ĝeinstruistoj kaj ĉ. 130 plenkreskuloj kun 36 infanoj vizitis la ekspozicion. Ili faris demandojn pri kiamaniere oni kunigis la desegnaĵojn, pri E-o kaj la esp-istaro. Post vizito aro da geknaboj aperigis artikolon pri la E-movado en bulteno farita de ili mem en infana ripozamuzejo.

La Eysines-grupo.

TIU ĈI VALORA EKSPOZICI-MATERIALO ESTAS DE NUN

DISPONEBLA ! La materialo, konsistanta el pli ol 400 verkaĵoj nun apartenas al la Ĝirondia Grupo de E-istaj Laboristoj, kiu denove prezentis ĝin en la Kulturdomo de Eysines (vd. ĉi-supre). Poste ĝi estos elmontrata en Le Fleix (Dordogne-departemento) komence de decembro. De nun tiun ekspozicio-materialon la Ĝirondia Grupo volonte disponigos por eventualaj interesatoj. Ĉi-lastaj

bonvolu sin turni al k-dino Simone GAILLARD, 27 rue Caillou, 33200 BORDEAUX, kiu prizorgas starigon de migradplano, ankaŭ plian informadon laŭdezire.

La financaj kondiĉoj estas vere maldrastaj : Transportokosto memkompreneble estos je ŝarĝo de la uzonto. Krom tio ni petos la mendintojn bonvole enverŝi mendokotizon je 100 FF en la kason de la Girondia Grupo de Esperantistaj Laboristoj por nutri fonduson celantan helpi al juna grupan(in)o partopreni en tutmonda kongreso.

La interesatoj ne tro longe atendu por enlistiĝi ; la unuaj mendantoj havos plej bonan ŝancon plenumi siajn dezirojn.

PERPIGNAN

Por la komenco de la kursoj de E-o ges-roj Jim kaj Jennifer DIMO el Aŭstralio prelegis en E-o ĉe la Kultura Kataluna Centro en Perpignan. Prezidis S-ro René Llech-Walter kaj tradukis franclingve por la neesperantista publiko S-ro Boumal.

Okaze de prezento de novaj diskoj de la Gajaj Trobadoroj en Perpignan, Llech-Walter kaptis la okazon por prelegi pri la internacia lingvo ĉe radio "STEREO 66".

UNUIGO PACISTA DE FRANCO (°)

U.P.F., franca sekcio de la Internacio de Militrezistantoj, kunveninta en kongreso la 7an de novembro 1982, en Parizo,

- publike akuzas ĉiujn armeojn, kiuj ebligas en la tuta mondo la forigon de la esencaj liberecoj kaj la neniigon de la homaj vivoj ;
- atentigas pri la kreskanta forpreno de laborfortoj por armilproduktado celanta la iluzion pludaŭrigon de reciproka militmalinstigo per teroro ;
- konstatas la malsaĝon de la mondaj ekonomiaj sistemoj baziĝantaj sur profito, individua aŭ kolektiva, kiuj kontribuas al prirabado de la Tria Mondo, akcelas la procezon de militarigo de la planedo kaj nepre kondukas al la milito ;

(°) Union Pacifiste de France, 4 rue Lazare-Hoche, F 92100 BOULOGNE. La teksto de ĝia leĝpropono por unuflanka malarmado de Francio ekzistas en E-traduko.

- rekomendas, cele al starigo de ekonomio baziĝanta sur la bezonoj, la transformadon de la militindustrioj, kiu ebligas la produktadon de socie utilaj aĵoj ;
- fratece salutas kaj subtenas ĉiujn pacistojn kaj pro-konsciencajn objektojn, ĉiujn kontraŭmilitaristojn, kiuj, pro motivoj de ne plu valida nacia suvereneco, eltenas subpremadojn, kaj tio en la plimulto el la landoj, tiel same oriente, kiel okcidente ;
- postulas en Francio la nuligon de la proceduroj de mobilizado, kiuj minacas ĉiumomente la loĝantaron, eĉ dum paca tempo (Preskribo de 1959).

KAJ, EN TUJA ESTONTECO

- alvokas ĉiujn pacistojn, ĉiujn humanitaristajn organizojn, kontraŭbatali la projektojn de la ministro pri defendo, kiu, interkonsente kun sia kolego la ministro pri nacia edukado, intencas fari el niaj instruistoj la trejnistojn de konsterniga militista preparado ;
- rekomendas, kadre de la Monda Jaro pri Komunikado, la enkondukon de Esperanto en la instruadon ;
- opinias urĝe intensigi, kun ĉiuj Liberaj Pacfortoj, sian kampanjon por Unuflanka Senarmiĝo, sola racia rimedo por atingi mondan senarmiĝon.

Ha, tiuj pacistoj, salajrataj de l'Kremlino, estas vere malicaj ! Ne nur ili kondamnas ĉiajn militismojn, inkl. la orientblokan, sed ili eĉ rekomendas instruadon de E-o ! Mi konas iujn el tiu fiularo, kiuj krome lernis mem ! Ha, se mi scipovus la francan, mi tuj abonus al ilia revuo : 80 FF al UPF, pĉk : 3964 01 B Paris...

ESPERANTO en STRASBURGO

- Kultura Esperanto-Centro : ĝi plu kunvenas la duan mardon de ĉiu monato. La 14an de decembro, por festi Zamenhof-on, ĝi invitis la E-grupon de Oberkirch (malgranda urbo en la proksima Germanio) por kune manĝi flamkukojn en restoracio.
- ARAN-EO : la E-grupo de ARAN (Association des Résidents et Amis du Neudorf) organizas parolan kurson de E ĉiun lundon je la 20a horo ĉe ARAN, enirejo rue de Nomeny en Strasburgo-Neudorf, escepte dum la universitataj ferioj.

Informas Jakelino, tel : (88) 44 02 91

* La Zamenhof-tago en LE FLEIX (departemento Dordonjo) la 12an de decembro 1982 estis aparte sukcesa ! Ĉeestis pli ol 50 personoj el pluraj departementoj kun forta partopreno de la loka grupo, kiu sindone kaj talente preparis la tagmanĝon. Ve, la ĉefa organizanto ne povis ĝui tiun sukceson : li kuŝis en kliniko. Al S-ro Normand, al S-ino Normand kaj ĉiuj E-istoj en Le Fleix varman dankon pro la akcepto ! Matene ĉiuj povis admiri la internacian ekspozicion de infanaj desegnaĵoj . Posttagmeze, alia neforgesebla evento : ĝuste "La Evento", teatraĵo majstre prezentita de la trupeto "La Krizalido". Ĉiujn regalis tiu satira verketo pri la nuntempaj moroj. Brave! Kiel bonŝancaj ni estis !

- * En decembro 1983 la Zamenhof-tago okazos en ANGULEMO.
- * Venonta regiona kunveno en majo en Ĝersio (Lekturo), aranĝota de amiko J.C.Bourgeat. Detalaj informoj en venonta L!

GIRONDIO

Venontaj kunvenoj de la Ĝirondia grupo : "Maison pour Tous" en CENON-Palmer

- * Mardon 25an de januaro, je la 18a
- * Merkredon 9an de febr., je la 18a : eksterordinara kunveno okaze de la vizito de japana amiko.
- * Mardon 22an de februaro, je la 18a : ankaŭ en "Ĉies Domo"

Viziton de pola samideanino en nia regiono en junio '83 anoncas nia amiko Aristide LAGOUTTE, Le Hameau au Soleil, Bât.A, 66700 ARGELES-PLAGE, tel(68)36 06 11. Ĉiuj grupoj, kiu deziras gastigi la vizitontinon (kiu, tre lerta e-istino, povos rekompenci per konferencoj kun lumbildoj, kantado, deklamado, skeĉoj...) bonvolu rilati kun li plejeble frue.

TULUZO

Tuluza Societo por Esperanto (55D,rue des Arcs St Cyprien, 31300 TOULOUSE) kunvenos mardon 18an de januaro je la 20a. E-kursoj : ĉiulunde de 17.30 ĝis 19. en Tuluzo kaj ĉiunmerkredon (20h30/21h30) en Colomiers (C.A.C.)

TARNIO

"Tarn-Esperanto" estas la nomo de tutnova E-rondo, kiu naskiĝis en oktobro 1982 en departemento Tarn. (15 aliĝintoj). Adreso : Tarn-Esperanto, 3 rue Roquelaure, F 81000 ALBI. Bonvenon !

Kompreneble, la grupoj ne disponantaj propran rimedon informi pri siaj kunvenoj povas uzi "Laŭte!". Sed ili nepre atentu pri la aperdato menciita en ĉiu antaŭa numero. (Red.)

Kiam en 1947 la Unuiĝintaj Nacioj decidis pri nova dividado, ĉi-foje de Okcidenta Palestino, en du ŝtatojn - judan kaj araban - la juda flanko senplue, eĉ ĝoje akceptis la projekton, malgraŭ la absurdaj, strategie nedefendebaj limoj, malgraŭ la detranĉo de nia historia ĉefurbo, Jerusalemo. Kontraŭe al tio, la araboj lanĉis tuj murdan atakon, unue per armitaj bandoj, kaj post la forlaso de la britoj per masiva invado fare de ses najbaraj armeoj, por sufoki la ĵus naskitan judan ŝtaton (majo 1948). Nur dank' al nia heroa sindefendo fiaskis la diabla plano "ĵeti la judojn en la maron" laŭ la spirito de la "fina solvo" kunplanita kaj ellaborita de la germana nazia diktatoro kaj lia komplico, la jerusalema muftio kaj militkrimulo Haĝ Amin El-Husseini. Kompreneble, pro radikala ŝanĝo de cirkonstancoj, Israelo ne plu povis limigi sin inter la absurdaj landlimoj, taŭgaj eble por bonaj najbaroj kiel Nederlando kaj Belgio, kaj estis devigita, okaze de riĉpetiĝintaj provokoj, vastigi sian teritorion.

Laŭ dialektika leĝo, ekstremismo naskas ekstremismon. Interalie pro tio ekestis en Israelo, depost 1977, dekstrula, naciista reĝimo. Sed jen, paradoksmaniere ĝuste tiu ĉi reĝimo evakuis la vastan teritorion de Sinajo, preze de pakontrakto kun Egiptujo ; aliflanke ĝi rifuzas eĉ konsideri teritoriajn kompromisojn en Judeo, Samario, Gaza kaj Golan.

Laŭ humana vidpunkto oni povas kompati la mizerajn palestinajn rifuĝintojn vivantajn eĉ nun, post paso de 35 jaroj, en aĉaj tendaroj. Ilia amara sorto ŝuldiĝas al la amasiĝintaj mispaŝoj de iliaj senkonsciencaj gvidantoj, pli ĝuste misgvidantoj. Sed jen, preskaŭ samtempe kun la fuĝo de la palestinaj araboj, enmigris en Israelon proksimume la sama nombro da judoj elmigrantaj el la arabaj landoj ; ĉiuj jam delonge fariĝis utilaj civitanoj de la israela ŝtato, ĉar la malgranda juda popolo tutmonde per siaj limigitaj rimedoj kontribuis al ilia enkadriĝo kaj ensorbo en la socion.

Se Arafat ne estus strebinta al subfoso de la jordania reĝimo fare de PLO, ili ne estus de tie forpelitaj. Se PLO ne estus establinta piratan armeon kaj "ŝtaton" en Libano, la libana milito kun ĉiuj ĝiaj sekvoj ne estus okazinta. Entute, kial oni volas surŝultrigi la solvon de la "palestina problemo" al la eta Israelo, teritorie pli malgranda, ol Normandio, kaj ne al Arabujo, plena je fabelaj riĉaĵoj, pli vasta ol la tuta Eŭropa kontinento ?

.../...

La maldekstrula laborista bloko, reganta ĝis 1977 en Israelo, pretis al teritoriaj kompromisoj. Ŝajnas, ke la palestinanoj jam malfruis. Pro tio ili kulpigu nur sin mem.

Teddy Löwenkopf (Israelo)

Por la infanoj : *La domo de la nubeto*

La domo de la nubeto estas en la ĉielalto. Ĝi estas tre bela, kaj pro tio la nubeto decidis tie ĝin konstrui. La aliaj envas lin posedi tian domon.


Ĝi estas el musko leĝera kun tegmento malfermebla, kiam belas, kaj fermebla, kiam tondro terurigas nian nubeton. Senvitraj fenestroj estas ĉiuflanke, pordo, kaj ĉefe forno, kiu estas tre fantazia : ĝi ekbrulas, kiam ĝi volas ; oni nomas ĝin suno.

Li feliĉe vivas en tiu domo, kaj ĉiumatene oni aŭdas frapi al la pordo :

- Tok, tok, tok!

Estas liaj amikoj, kiuj venas lin preni por iri al la lernejo.

JP. Hennebois.




Legantino rimarkigis al la red., ke estus preferinde atentigi pri la abonfino ne sur la gazetbanderolo (kiun oni tuj forĵetas), sed sur la gazeto mem, kiun espereble oni legas, eĉ konservas.

- Bone, trafel! Jen do ĉi-sube nia nova, ja ne tre originala sistemo tri-ebleca :

★ Nenio en la kvadrato : trankvile plu legu "Laŭte!"

★ Baldaŭa abonfino : dato.....

★ Ruĝa kruco = abono jam finita ; vi riskas ne ricevi la venontan n-ron!



La venonta numero aperos fine de marto 1983

Gérant & imprimeur : Baudé, F 47340 Laroque Timbaut

Commission paritaire 58 651

78/4/83